

## Doktoro Zamenhof kaj Unesko

*Parolado eldirita la 15-an de decembro 2004  
en la Pola Ambasadejo - Kopenhago*

Via Ambasadorina Ekscelenco!  
Sinjorino Kultura Ataŝeo!  
Sinjorinoj kaj Sinjoroj!

Kiam mi estis junulo dekkelkjaraĝa, la vivoj kaj verkoj de kvar grandaj personuloj el *pola tero* forte impresis mian junan menson kaj postlasis stampon daŭran. Ili estas:

1. la komponisto *Frédéric Chopin*, majstro de la piano;
2. la astronomo *Nicolaus Copernicus*, kiu 'reduktis' nian Teron al simpla planedo rondiranta ĉirkaŭ la Suno;
3. la fizikistino *Maria Curie-Skłodowska*, granda pioniro sur la kampo de radioaktiveco;
4. sed antaŭ ĉio la okulkuracisto *Lazaro Ludoviko Zamenhof*, la aŭtoro de la *Internacia Lingvo Esperanto*.

Li naskiĝis la 15-an de decembro 1859, en Bjalistoko, kiu tiutempe estis parto de la rusa regno.

La patro estis instruisto de modernaj lingvoj; homo saĝa kaj severa, skeptika je revoj, obstina je laboro. Tio ja ankaŭ necesis por vivteni familion fine 10-membran.

La patrino havis naturon dolĉan, anĝelan. Ŝi estis bonkora, sentema kaj ĉiel modesta, tre religiema. Ŝi edukis siajn infanojn, el kiuj Lazaro Ludoviko estis la plej aĝa, ke ĉiuj homoj estas fratoj kaj egalaj antaŭ Dio.

Sur la stratoj kaj kortoj de Bjalistoko Lazaro Ludoviko rapide konstatis, ke tiel idilia la ĉirkaŭa mondo ne estas. En lia naskiĝurbo loĝis pluraj nacioj kun malsamaj lingvoj: *hebreoj* – la Zamenhof-familio estis hebrea – *poloj*, *rusoj*, *germanoj* kaj *belorusoj*. Tiuj popoloj vivis en konstanta reciproka malamo, kiu manifestiĝis ankaŭ en bataloj prilingvaj. Tio forte turmentis la senteman animon de Lazaro Ludoviko. Plurfoje li diris al si mem: "*Kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.*"

Unu post la alia li forĵetis diversajn infanajn utopiojn. Restis nur la revo krei por la homaro iun neŭtralan lingvon. "*Kiam la popoloj povos libere sin kompreni, tiam ili ĉesos reciproke sin malami,*" kiel li skribis multajn jarojn poste.

Fine de 1873 la familio transloĝiĝis al Varsovio, kaj en la sekva jaro Lazaro Ludoviko eniris la kvaran klason de la Dua Filologia Gimnazio. Li havis grandan talenton por lingvoj. Post la

abiturienta ekzameno li studis medicinon en Moskvo kaj Varsovio kaj fine iris al Vieno por specialiĝi pri okulmalsanoj.

\* \* \*

Sian ideon pri neŭtrala lingvo Zamenhof komencis realigi jam kiel gimnaziano, kaj li ĝin zorge flegis dum la postaj studjaroj. Persiste li serĉis solvon la plej bonan, la plej efikan. Dum jaroj li elprovis la bazojn de sia lingvoprojekto kaj kuraĝe forĵetis ĉion, kio en la praktiko montriĝis netaŭga; li faris korektojn, plibonigojn. Timante esti mokata, Zamenhof parolis al neniuj pri siaj laboroj, sed en soleco li daŭre elprovis sian projekton per tradukoj kaj originalaj verketoj. Li ankaŭ penis pensi rekte en la nova lingvo. Finfine ĝi fluis, flekseble, gracie, libere, kiel la gepatra lingvo. Ĝi estis matura por publikigo.

En julio 1887 eliris el presejo en Varsovio 40-paĝa libreto kun la titolo:

*Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto*

Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro

[por rusoj]

En la sama jaro D-ro Zamenhof eldonis ankaŭ polan, francan kaj germanan versiojn de tiu unua broŝuro, ĉiam laŭ la sama plano: Antaŭparolo; alfabeto de la Lingvo Internacia; 16 gramatikaj reguloj; kelkaj Esperantaj tekstoj, inter ili la kristana preĝo *Patro Nia* kaj la poemeto *Ho, mia kor'*; kaj fine vortaro Internacia-nacia kun iom pli ol 900 *radikoj*. Tio ŝajnas malmulto, sed el ili oni povis fari proksimume 10.000 *vortojn*. Baldaŭ aldoniĝis novaj radikoj kun forte kreskantaj vorteblecoj. Esperanto estas same esprimkapabla kiel la lingvoj naciaj!

Komence de 1888 D-ro Zamenhof eldonis novan broŝuron, en kiu li esprimis sian dankon al la multaj homoj dise en la mondo, kiuj kun entuziasmo akceptis lian *Lingvon Internacian* kaj komencis ĝin ellerni. '*Doktoro Esperanto*' ne plu estis sola. La pseŭdonimo de la aŭtoro baldaŭ iĝis la nomo de la lingvo mem. En multaj landoj rapide fondiĝis Esperanto-societoj, kaj jam en 1889 aperis la unua gazeto en la Internacia Lingvo.

Por D-ro Zamenhof komuna tuthoma lingvo neniam estis celo al si mem, sed nur unu el la plej gravaj rimedoj por forigi la miskomprenojn, suspektojn kaj malamon inter la popoloj, por krei kondiĉojn de interkompreniĝo kaj reciproka respektado. La esenco de tiu ideo estas koncize esprimita en unu sola simpla frazo, kiun li eldiris en aŭgusto 1905, kiam por la unua fojo en la historio de la homaro preskaŭ 700 personoj el dudeko da landoj interkompreniĝis per komuna, supernacia lingvo: "*Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marjo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.*"

\* \* \*

Esperanto estas donaco al la tuta homaro; ĝi ne restu privilegio de malgranda minoritato. Tial la Esperanto-parolantoj baldaŭ revis pri ia oficiala rekono de la lingvo.

Tiun deziron oni provis atingi i.a. helpe de la *Ligo de Nacioj*, fondita post la finiĝo de la Unua Mondmilito, kun sidejo en Ĝenevo, Svislando. Pro forta kontraŭstaro, precipe de la grand-potencoj, la sola rezulto de kvar jaroj da klopodado ĉe la Ligo estis rekomendo akcepti Esperanton kiel 'klaran' lingvon en telegrafio. Tion la *Universala Telegrafa Unio* aprobis en 1925. Por telegramoj en Esperanto oni de tiam pagas laŭ la nombro de vortoj, ne laŭ la nombro de literoj.

La Dua Mondmilito frakasis ankaŭ la Ligon de Nacioj. Sur ties ruinoj oni fondis en oktobro 1945 novan interŝtatan organizaĵon: *Unuiĝintaj Nacioj*, kun sidejo en Usono.

Komence de 1946 la Esperanto-movado startigis plurjaran tutmondan subskribkampanjon favore al Esperanto. Tiucele estis presita mallonga *Deklaracio* en 25 lingvoj. En ĝi oni petas Unuiĝintajn Naciojn per ĉiuj disponeblaj rimedoj helpi la vastigon de la uzo de Esperanto, ekz. kuraĝigi ĝian instruadon en la lernejoj kaj evoluigi ĝian uzon en la turismo, internacia komerco kaj korespondado.

En la tuta mondo oni kolektis subskribojn de gravaj organizaĵoj kaj de unuopaj personoj. Ĝis la fino de 1949 subskribis la Deklaracion 492 naciaj kaj internaciaj organizaĵoj kun entute pli ol 15 milionoj da membroj kaj krome preskaŭ 900.000 individuaj personoj.

Pollando kontribuis per pli ol 550.000 kolektivaj kaj individuaj subskriboj, el kiuj elstaris tiu de la tiama ministroprezidanto, s-ro *Józef Cyrankiewicz*. Per tio via lando okupis la 7-an lokon en la subskribkampanjo; Danlando la 19-an per ĉ. 11.000 subskriboj.

En aŭgusto 1950 *Universala Esperanto-Asocio* (UEA) oficiale transdonis la Deklaracion al Unuiĝintaj Nacioj, kies sekretariato kelkajn tagojn poste transsendis ĝin al Unesko, por ke ĝia organizaĵo pri edukado, scienco kaj kulturo pritraktu la aferon.

Ĝia supera organo, la Ĝenerala Konferenco, por la unua fojo havis Esperanton en la tagordo dum sia sesio 1952 en Parizo, sed oni ne sukcesis fari decidon, kiel reagi je la prezentita Deklaracio; tio estis prokrastita ĝis 1954 en Montevideo. La Sekretariato de Unesko ricevis la taskon intertempe kolekti informojn pri la instruado de Esperanto kaj la uzo de la lingvo en diversaj landoj.

Raportoj pri tio estis kunmetitaj en dudeko da landoj. *Centro de Esploro kaj Dokumentado*, Londono, kies ĉefo estis Prof. *Ivo Lapenna*, laŭ peto de la Sekretariato de Unesko ellaboris 250-paĝan raporton pri la Esperanto-movado en la tuta mondo. Tiu dokumento donis tre koncizan bildon pri ĉio, kio estis kreita en la Internacia Lingvo kaj pere de ĝi dum ĝia tiam 66-jara ekzistado. Por la delegitoj de la Unesko-Konferenco en Montevideo la Centro de Esploro kaj Dokumentado krome ellaboris dokumenton, en kiu estis prezentitaj la kontribuoj de la Esperanto-movado al la celoj kaj idealoj de Unesko.

Por doni al la konferencanoj la eblecon per propraj okuloj sperti la kulturan signifon de Esperanto estis aranĝita impona ekspozicio kun 3.000 libroj, 600 gazetoj kaj revuoj, granda nombro da sciencaj verkoj, perspektivoj pri diversaj landoj kaj urboj, ktp.

Dum la tuta Unesko-sesio la Esperanto-movado estis reprezentita de D-ro *Ivo Lapenna*, profesoro pri internacia juro, unue ĉe la *Universitato de Zagreb*, poste ĉe *The London School of Economics and Political Science* de la *Universitato de Londono*. Dum la konferenca periodo li havis la okazon paroli – multlingve – kun 300 delegitoj de kvindek da delegacioj

kaj fine sukcesis, ke la Ĝenerala Konferenco la 10-an de decembro 1954 akceptis jenan rezolucion favore al Esperanto:

*La Ĝenerala Konferenco,*

diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto (8C/PRG/3);

1. *notas* la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
2. *rekonas*, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;
3. *notas*, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;
4. *komisias* la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

Dum la Konferenco en Montevideo ankaŭ estis establita konsultaj rilatoj inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio. Tiu organizaĵo tuj komencis densan, valoran kunlaboron kun Unesko, kaj ĝia laboro vere estas aprezata.

Laŭ iniciato de *Ivo Lapenna* kaj propono de Brazilo, Japanio kaj aliaj la Ekzekutiva Komitato de Unesko en novembro 1959 deklaris D-ron Zamenhof unu el la 'grandaj personuloj de la Homaro' kaj invitis ĉiujn registarojn kaj Naciajn Unesko-Komisionojn partopreni en la memorigo de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo. Tio estas la plej elstara rekono iam ajn donita al D-ro Zamenhof aŭ al lia memoro pro la genia verko, kiun li donis al la homaro, kaj pro la noblaj ideoj de humanismo, kiujn li ligis al ĝi.

*Mogens Rude Andersen*  
Espergærde - Danlando